

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. :- :-

ABONO: jare 1 Sm. (holande: 1 gulden 20 cent), duonjare $\frac{1}{2}$ Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko. :-

Por kio vi vivas?

Kiu nenion konas, por kio ĝi estus
ema oferi sian vivon, tiu ne scias,
por kio ĝi vivas.

Foje sur strato de iu urbo iu laborejlernanto ege penante veturigis duradan veturilon — sufiĉe ŝarĝitan. La vojo iris iom monten. Kaj kiam la knabo fine atingis la supran punkton de la strato, li haltis kaj, sidiĝinte sur la puŝilo de la veturilo, demetis la ĉapon kaj forviŝis la ŝviton de sia frunto.

— En la ŝvito de via vizaĝo manĝu panon vian! sin turnis al li iu viro, staranta je la stratangulo.

La junulo responde ridetis.

— Vi honeste plenumas la biblian ordonon, diris la viro, alproksimiĝinte al la junulo.

— Kion do mi devas fari? Ne por mi sola, sed por ĉiuj tio estas skribita . . .

— Sed ne de ĉiuj ĝi estas plenumata, aldonis la viro. Mi ankoraŭ neniam vidis iun ajn riĉulon aŭ potenculon tiel ŝvitantan pro lia laboro, kiel, ekzemple, vi jen ŝvitas.

Le junulo nenion respondis kaj denove forviŝis per sia ĉemizmaniko la ŝviton.

— Ĉu vi trovas natura, ke vi devas tiel penadi, dum aliaj homoj tute ne bezonas labori?

— Mi ne povas tion aliigi, mallaŭte respondis la junulo.

La viro demandis lin, kie li laboras, ankaŭ pri la salajro kaj pri liaj gepatroj, fratoj k.t.p. kaj poste li denove komencis:

— Vi diris, ke vi ne povas aliigi tion, ke vi devas tro

labori, dum aliaj nenion faras. Sed ĉu vi trovas tiun aferordon natura?

La junulo meditis, sed nenion respondis. Tiam la viro ree sin turnis al li:

— Tre multaj homoj, eĉ la plimulto el ni, trovas ĉion, kio por ili ne estas novaĵo, tute natura. Ekzemplo: al multaj el ni ŝajnas tute natura, ke ekzistas riĉuloj kaj malriĉuloj; ke la malriĉuloj devas labori, ĉiam labori, kaj tamen tre ofte malsati, kaj ke la riĉuloj povas konstante diboĉi nenion laborante. Oni tiel kutimis konsideri ĉion nun ekzistantan kiel natura, ke eĉ la plej evidenta malnaturaĵo ŝajnas al ni esti natura. Ekzemple pripensu: ĉiu homo naskiĝas sur la tero. Sekve ĉiu homo devas vivi sur la tero. Homo sen tero estas kiel fiŝo sen akvo. Se oni eltiras fiŝon el akvo, tiam ĝi vivas iom da tempo, sed nur mallonge. Kaj ĉu tiu konvulsia saltado sur la bordo, kien oni eljetis ĝin, povas esti nomata vivo? Ne, ĝi estas agonio — batalo de la mortanto kontraŭ la morto. Tiel same ĉiu homo, se oni senterigas ĝin — tiam ĝia vivo ne estas plu vivo, sed nur agonio — batalo de la mortanto kontraŭ la morto. Kaj efektive ni vidas, ke la grandega kvanto da homoj estas kvazaŭ fiŝoj eljetitaj sur la bordon — nome sur la stratojn. Kaj tamen preskaŭ ĉiu el ni trovas tion natura.

La junulo mire rigardis la viron. La viro rimarkis tion kaj diris:

— Vi ne kredas? Mi tuj pruvos. Rigardu ĉirkaŭ vi: la tuta tero apartenas al iu ajn, nur ne al vi. Vi eĉ ne rajtas dormi, se vi ne pagis por la loko, kie vi dormas. Nur la vojoj kaj la stratoj estas al vi disponigataj. Sed ankaŭ ne laŭplaĉe vi povas uzi ilin. Oni permesas al vi uzi ilin nur por via translokiĝado. Se vi, estante lacigita, haltas sur la strato por ripozi, tiam oni nur toleras tion. Oni toleras, ke vi haltu por ripozi. Sed nur por iom ripozi. Provu, ekzemple, tie ĉi — kie ni ambaŭ nun interparolas — pasigi nokton dormante. Se la policisto ekvidos vin, li tuj postulos, ke vi iru plien. Kaj se vi respondos, ke vi ne havas rifuĝejon kaj pro laceco rifuzos plenumi lian ordonon — tiam vi certe estos arestata kaj punata. Kaj plie: se vi volas iom manĝi, vin vestigi aŭ havi iun ajn necesan ilon, tiam vi devas pagi. Kaj pagi tiom, kiom postulos de vi la sinjoroj de la tero. Sed se vi pensas, ke vi, naskiĝinta sur la tero, rajtas preni de ĝi ĉion, kion vi por via ekzistado bezonas, preni sen permeso — tiam vi tuj estos arestata kaj punata. Nome —

pro ne respektado de la proprajrajto. Nu, ĉu vi ne estas eljetita sur la straton kiel fiŝo sur la bordon? Kaj vi ne estas sola en tia situacio. Mi jam diris, ke la grandega parto de l' homaro estas senterigita. Kvankam ĉiu homo laŭ la naturo havas rajton rilate al la tero. Nome ĉiu homo. Ne nur riĉuloj kaj potenculoj, sed ĉiu homo. Vi ank a ŭ. Ni nur forgesis pri nia rajto. Kaj la „iertuloj“, uzante la favoran cirkonstancon, elpensis diversajn leĝojn, anstataŭigis la naturajn rajton per „laŭleĝaj“ kaj jen — vi rajtas nur esti sur la tero. Nenion pli. Ĉu ne la saman rajton oni donis al ĉiu bruto, paŝtata sur la herbejo? La diferenco nur estas, ke al brutoj oni permesas ne nur esti sur la tero, sed oni ankoraŭ zorgas, ke ili ĉiam estu sataj. Ĉar nur sata bruto utilas al sia sinjoro. Kaj sinjoroj ĉiam celas el ĉio eltiri profiton. Tial nur pro la profito, pro sia profito, ili permesas, ke ankaŭ vi troviĝas sur la tero. Ĉar ili bezonas vin — por ke vi laboru por ili. Sed ili ne zorgas pri tio, ke vi estu sata. Ili diras al vi: „ĉiu mem zorgu pri si!“ Kaj pri la demando, ĉu vi povas per via laboro gajni sufiĉe da mono, por satigi vin — ili ne interesiĝas. Kaj se vi tro laborante kaj ne havante sufiĉe da nutraĵo baldaŭ elspezos ĉiujn viajn fortojn kaj ne povos plu labori por ili — tio ne timigas ilin: miloj de aliaj malriĉuloj atendas eblon anstataŭigi vin. Ili ĉiuj volas manĝi, sed ne ĉiuj povas konstante havi laboron ĉe la posedantoj. Ofte laborokazo mankas por multaj el ili.

Kaj jen la nunaj vivkondicoj:

La tuta tero kaj ĉiuj riĉaĵoj estas dividitaj inter multajn personoj. La plimulto de la homaro estas senhavigita. La posedantoj havas tiom, ke ili mem ne povus ĉion prilaboradi, se ili tion ankaŭ volus. Sed ili tute ne volas: ili preferas, ke la proletarioj (la nenion posedantoj) laboras por ili. Kaj, efektive, la proletarioj por ili laboras, laboras por bagatela salajro, tre ofte ne sufiĉa por satigi la laboranton kaj ĝian familion. Kaj multaj proletarioj, ne povante trovi laborokazon, malsatas, malsatas en la plena senco de l' vorto.

Pripensu: la homoj malsatas ne tial, ĉar la tero ne povas liveri sufiĉe da nutraĵo por ĉiuj. Tute ne! Kiom da tero restas ankoraŭ ne kulturata, neekspluatata! Kaj rigardu ĉirkaŭ vi: kiom da tenejoj, magazenoj kaj vendejoj estas plenigitaj per la produktoj, kiuj mankas al la mizerigitaj proletarioj. Ne, la proletarioj malsatas nur tial, ĉar oni prenis de ili la eblon ekspluati la teron por si mem. Sed por aĉeti ĉion

por la ekzistado necesan ili ne havas sufiĉe de mono. Kaj tial, pro la malriĉeco de la popolamasoj, ankaŭ tre ofte okazas senlaborado por multaj laboristoj: la posedantoj ne povas laborigi ĉiujn volontajn labori, ĉar en tiu okazo la produktoj amasiĝus tiom, ke ili, de neniu aĉetataj, fariĝus ne uzablaj. La militoj, kies celo tre ofte estas akiri novajn landojn por pli favora debito de komercaĵoj, utilas nur al la posedantoj. Sed la situacio de la senhavigitaj, malsatantaj proletarioj, kiuj laŭ la ordono de sinjoroj „militas” — interbuĉadas, por ke la sinjoroj ankoraŭ plu sin riĉigu, restas la sama aŭ ankoraŭ malplibonigas. Ĉar dum kaj post la milito la prezoj de ĉiuj produktoj tiom plialtiĝas, ke la bagatelan plialtigon de la salajro oni tute ne povas kompari. Ĉu tiaj vivkondiĉoj estas naturaj? Ne, vere ne! Kaj tial ni volas tiujn kontraŭnaturajn vivkondiĉojn aliigi. Ne, ni volas detruji ilin. Ni volas purigi la vojon por aliaj vivkondiĉoj, kies celo estas la bonstato de ĉiuj homoj. Kaj nome la bonstato bazita sur natura fundamento. Jen, en malmultaj vortoj, esenco de tio, kion ni volas:

Ĉiu homo naskiĝas, por ke ĝi vivu. Sed neniu homo povas vivi sen nutraĵo, tiel same kiel neniu povas vivi sen akvo, sen aero. Kaj la nutraĵon liveras la tero. Tial la tero devas esti por ĉiuj homoj. Ne por unuopaj personoj. Tiel same kiel la aero. Kaj kiel la tero, tiel same la maŝinoj, la iloj destinitaj por la ekspluatado de la tero kaj de ĝiaj produktoj. Ankaŭ la fabrikejoj devas esti disponigataj al ĉiuj. Al ĉiuj — ne al unuopaj personoj. Ĉar se al iu ajn estus permesata deklari, ke tiom da tero, aŭ tiu fabrikejo, aŭ tiuj maŝinoj estas ekskluziva posedaĵo de li, tiam ankaŭ aliaj posedemuloj povos fari la samon, kaj baldaŭ la tuta tero kaj ĉiuj riĉaĵoj estus denove dividotaj inter malmultaj personoj kaj la plimulto de l' homaro estus denove senhavigita. Tial nenio apartenu al iu ajn, sed ĉio al ĉiuj. Kaj al neniu manku, kion ĝi bezonas.

Do en la estonteco nek posedantoj, nek „sinjoroj.” Do nek iuj ajn leĝoj — leĝoj elpensataj. Ĉar ĉiu tia „leĝo” estas nur esprimo de tio, kion volas la „sinjoroj”. Kaj la sinjoroj volas nur la bonstaton por si mem, je la konto de la ceteraj. Sed ni volas la bonstaton por ĉiuj. Kaj tial ĉiuj tiaj „leĝoj” estu nuligitaj. La homoj havas aliajn leĝojn — nome la leĝojn, kiuj rezultas el la postuloj de la naturo.

Ekzemplo: „Ĉiu estu sata!” Tiu leĝo estas vera leĝo. Ĝi ne estas de iu ajn homo elpensita. Ĝi estas donita de

la naturo mem. Ĝi ne bezonas esti skribita, presita. Neniu ministroj aŭ parlamentoj penadis, por krei ĝin. Ĝi ĉiam ekzistis kaj ĉiam ekzistos. Kaj de ĉiu ĝi estas konata. Ĝian postulon sentas ĉiu: ĉu junulo, ĉu maljunulo, ĉu klerulo, ĉu malklerulo, ĉu saĝulo, ĉu malsaĝulo, ĉu bonkorulo, ĉu malbonulo. Tiun leĝon ĉiu devas, ne pre devas respektadi: alie la neobeanto pli aŭ malpli baldaŭ ĉesos esti homo. Sed se la homo volas vivi, vivi en la plena senco de l' vorto, tiam ĝi devas tiun leĝon atenti: malsata homo ne povas bone uzi nek siajn korpajn, nek spiritajn fortojn; nek ĝi povas gardi sian personan liberecon. Do tia homo ne povas vivi.

Tamen ne sufiĉas nur esti sata: la homo devas esti ankaŭ vestita kaj havi rifuĝejon — bonan rifuĝejon. Tio estas necesa, por ke ĝi restu sana kaj forta. Sed por ke ĉiu homo estu sata, bone vestita kaj havu rifuĝejon — por tio estas necesa, ke ĉiu laboru! Ĉiu laŭ sia povo kaj kompreno prilaboru kaj kulturu la teron, ekspluatu ĝin kaj ĝiajn produktojn.

Sed komprenu bone: ĉiu ekspluatu la teron kaj ĝiajn produktojn, sed ne siajn kunhomojn — kiel oni faras nuntempe.

Se ĉiuj homoj laboras — ĉiu por ĉiuj, kaj ĉiuj por ĉiu — tiam neniu devos tro labori. Kaj malgraŭ tio ĉiu povos ĝui la vivon.

Kaj jen ankoraŭ unu el la plej gravaj leĝoj: **Estu libera!**

Ĝi ankaŭ ne estas ia elpensajo, ia kreaĵo de iu parlamento aŭ „revolucia komitato”. Ne, ĝi estas vera leĝo donita de la naturo mem. Tion pravas la cirkonstanco, ke ĝin kiel la leĝon — „estu sata!” sentas ĉiu estajo je si mem.

Etienne de la Boétie en la jaro 1346, skribante pri la „libervola subiĝo” diras: „Se nur la homoj ne estus tiel surdegaj! Eĉ la sovaĝaj bestoj vokas al ili: „Vivu la libereco!” Kaj tiu pensulo memorigas nin: inter la bestoj estas multaj, kiuj preferas morti, ol ke ili permesas, ke oni subiĝu ilin. Kaj la aliaj, la plej grandaj tiel same kiel la plej malgrandaj, kiam oni volas kapti ilin, ili defendas sin per dentoj, ungoj, kornoj, piedoj, bekoj, kaj per tio montras sufiĉe klare, kiom valoras por ili la libereco de ili perdota. Kaj jam kaptitaj, ili klare esprimas kiel ili sian malfeliĉon konas. Kaj oni povas tre bone vidi, ke de tiu momento ili ne ĝuas la vivon, sed nur funebras pri la perdita libereco.

Por malsovaĝigi ĉevalon, kiun ni volas fari servema por ni, ni komencas tuj post ĝia naskiĝo kutimigi ĝin, karesante.

Kaj tamen malgraŭ ĉiuj tiaj karesoj, kiam dum la dresado oni instigas la ĉevalon per spronoj, ĝi obstinegas kaj piedbategas, por montri sian naturon, aŭ almenaŭ por esprimi, ke ĝi ne libervole servas, sed nur ĉar ni devigas ĝin. „Tiel ĉiuj estajoj, se ili ĝenerale havas la kapablon senti, sentas la sklavecon kiel malbonon kaj penadas reakiri la liberecon.”

Kion rakontas Etienne de la Boëtie, tion ni povas ĉi-momente observi en la naturo. Sed ni ankaŭ povas observi, ke se iu ajn malatentas tiun leĝon donitan de la naturo, tiu suferas.

Sed neniu homo sola povas esti libera. Por esti vere libera, estas necese, ke ĉiuj estu liberaj. Ekzemple: kiel vi povas esti libera, se vi estas ĉirkaŭata de tiranoj kaj sklavoj, sinjoroj kaj servistoj, ordonantoj kaj obeantoj, — de homoj ne respektantaj la indecon de la aliaj, nek sian propran? La tiranoj nepre volos sklavigi vin ankaŭ, sklavigi — ĉar ili ne povas toleri homon liberan: homo libera estas danĝera por ili. Kaj se la tiranoj volos sklavigi vin, tiam la sklavoj, ĉu laŭ la ordono de siaj sinjoroj ĉu pro sia humilegeco helpos ilin plenumi tion. Tial se vi volas esti libera, tiam volu, ke ĉiuj estu tiaj.

Sed por esti libera estas nepre necese, ke ĉiu respektu sian indecon: homo respektanta sian indecon ne permesos, ke oni sklavigu ĝin. Kaj ĝi ankaŭ ne toleras, ke oni sklavigu aliajn. Ĉar kiu vere respektas indecon sian propran, tiu respektas ĝin de la aliaj.

Kaj se ne estos sklavoj, tiam ne estas tiranoj.

Jen en malmultaj vortoj la esenco de tio, kion ni deziregas. Jen por kia vivo ni purigas la vojon. Jen por kio ni, la anoj de la Libera Socialismo, nun laboras, batalas, vivas, suferas kaj por kio ni ĉi-momente estas pretaj oferi nian vivon!...

Jen broŝureto, en kiu vi trovos la pensojn de mi konigitajn hodiaŭ al vi. Legu, relegu. Bone pripensu. Priparolu kun viaj kamaradoj. Kaj poste demandu vin mem: ĉu nia vivo havas sencon, havas valoron? Tiam demandu vin — kia senco estas de via vivo? Por kio vi vivas?

Pripensu, ĉu la vivcelo de ni ne estas por vi akceptebla? Pripensu bone kaj fine, se vi trovos, ke valoras vivi, por efektiviĝi la celon de ni, de la anoj de la Libera Socialismo, tiam zorgu enpenetri tiom la sencon de la vortoj: „Estu sata! Estu libera!” ke tiuj postuloj de la naturo ne ekstermeble enpenetru vin, vian sangon kaj karnon. Ka-

tiam vi vidos, la vivo mem montros al vi, kion vi plie faru.

Vi kaj mi, sole ni ambaŭ, ne povos efektiviĝi la Liberan Socialismon. Sed jam miloj da homoj laboras je la sama celo. Kaj se ĉiu el ni plenumadas sian taskon, diligente kaj ame diskonigados niajn ideojn, kiom da novaj anoj ni akiros! Kian grandegan forton ricevos niaj kunigitaj penadoj! Kaj se kelka el ni eĉ ne ĝisvivos la momenton, kiam ekbrilos la unua sunradio de nia tago, de la unua tago de la vivo, por kiu ni batalis kaj suferis — ĉu la konscio, ke ni ne vane vivis, nenion valoras?!

Nun mi ĉesas ripetante: pripensu bone, kion vi hodiaŭ aŭskultis, kion vi legos en la broŝureto ĵus donita al vi.

Ĉiu spesdeko por pano aŭ rifuĝejo de vi elspezata memorigu al vi nian interparolon! Ĝin memorigu al vi ankaŭ ĉiu spesdeko de la salajro, kiun oni eljetos al vi por via laboro!

Kaj hodiaŭ miaj lastaj vortoj al vi estu la vortoj de Said-ben-Hamed: „Nur iom da vivo, jen estas ĉio, kio apartenas al vi. Do atentu, faru el ĝi ĉion, kion vi povas.”

D. J.

La Balkanmilito.

V. (Fino).

La Balkanligo. Kontraŭ malfortiĝinta, elĉerpita, interne disŝirata Turkujo sin levis en aŭtuno de 1912 minaca potenco — la ligo de l' Balkanŝtatoj, kiuj nelongantaŭe ankoraŭ bataladis inter si. Kiaj cirkonstancoj ebligis la starigon de tiu ligo?

En la dua artikolo (vidu no. de Aprilo) ni vidis, kiel kaj kial la nacioj — precipe Bulgaroj, Serboj kaj Grekoj — batalis unu kontraŭ aliaj. En tiu batalo la greka eklezio konstante perdis da kampo. Serboj kaj Bulgaroj fariĝis pli fortaj, la unuaj precipe en Malnova Serbujo, la lastaj en Makedonujo.

La revo de l' helenismo: peli la Turkojn el Eŭropon kaj fondi novan Grand-Grekujon kun Konstantinoplo por ĉefurbo, sin prezentas pli kaj pli kiel utopio. Grekujo, submetante sin al tiu fakto, kiun ĝi povis bedaŭri sed ne povis neigi, turnis sian atenton pli al la insuloj en la Maro Egea, Kreta k.t.p., kies loĝantaro estas ĉefe greka. Tio kaŭzis la militon de 1897 kun Turkujo. Grekujo malvenkis. Ĝi kon-

vinkiĝis, ke ĝi bezonas helpon kontraŭ Turkujo, ke ĝi devis interligiĝi kun aliaj ŝtatoj.

Nu, ĝi nemulte sin okupis plu kun Makedonujo; tial la granda kaŭzo de malpaco kun Bulgarujo estis for — la rilatoj inter ili pliboniĝis kaj kreigis bazo por ligo inter Grekujo kaj Bulgarujo.

Samtempe pliboniĝis la rilatoj inter Serbujo kaj Bulgarujo. Aŭstrio fermis sian limon por serbaj produktoj; tiu politiko devigis Serbujon serĉi alian vojon. Ĝi klopodis fari komerco-traktaton kun Bulgarujo; sed Aŭstrio nebligis tion. Tiam Serbujo provis krei fervojon Danubo-Adria, por havi senperan komunikadon kun la Adria maro; Aŭstrio malsukcesigis ankaŭ tiun klopodon. Al Serbujo restis nur: havigi perforte al si vojon al la maro. Nur unu tia vojo estis ebla — nome tra Albana teritorio, do tra parto de Turkujo. Serbujo, mem ne sufiĉe forta kontraŭ Turkujo, sentis do ankaŭ, same kiel Grekujo, la bezonon: interligiĝi kun aliaj ŝtatoj, ĉar sola ĝi ja ne povus depreni al Turkujon la teritoron, kun ĝi bezonis por igi sin nedependa de Aŭstrio. Ĝi ĉesis sian nacian propagandon en Makedonujo. Tiu propagando ja estis proksimume senfrukta — la bulgara eksarkato triumfis kaj ne estis forpuŝebla. Serbujo tial sin kontentigis kun Malnova Serbujo; la nacia batalo inter serboj kaj bulgaroj por la momento finiĝis. Bazo por ligo bulgar-serba de tiam ekzistis.

Tiel Grekujo, Bulgarujo, Serbujo inter si proksimiĝis. Tiam aperis sur la scenejo: Rusujo, kiu ne forlasis ankoraŭ sian revon pri panslava regno de Peterburgo al Konstantinoplo. En Balkanligo ĝi vidis la potencon, kiu unuflanke povas malfortigi Turkujon, kaj aliflanke povas esti forta kontraŭulo al la danĝera malamiko de Rusujo: Aŭstrio. Rusujo tial ege deziris, ke naskiĝu balkanligo; ĝi aprobis, favoris kaj akcelas la starigon de tiu ligo, al kiu ankaŭ aliĝis Montenegro, vazalŝtato de Rusujo.

La Balkanligo tiam atendis favoran momenton por riski atakon. Tiu momento sin baldaŭ prezentis. Kiam Turkujo kvazaŭ svenis pro diversaj katastrofoj — la venko de l' albanoj, la perdo de Tripolis, la ribelo de l' subpremitaj popoloj, la malvenko de l' junturka reĝimo — tiam la Balkanligo prezentis siajn postulojn. Montenegro deklaris al Turkujo la militon — kaj la Balkanmilito estis eksplodinta.

Jen estas la antaŭhistorio de l' Balkanmilito.

Oni ne povas nei, ke tiu milito havas la aspekton de

liberiga milito. La proletariato de Eŭropo, tamen, kontraŭstaris tiun militon. Ĝi estas certa, ke tiu milito ne povos naski liberecon. La „liberigitaj” regionoj ne estos liberaj. La venko de l' Balkan-armeoj liberigos, sendube, la makedonan teriston de l' turka terposedanto. Sed ĝi ne liberigos lin de subpremo de la flanko de l' proprenaciaj ekspluatantoj, nek de tributdevo al eŭropa bankkapitalo, kiu post la milito per siaj milionoj devos helpi la Balkanŝtatojn, kaj kiu prenos, kiel renton, la fruktojn de la laboro de l' tuta loĝantaro. La libereco, per la nuna milito akirita, estas la burĝa libereco, la libereco por ekspluati kaj ĉiumomente preta subpremi mem aliajn naciojn.

La manifesto de Bazel tial prave diras: „La socialistoj de l' Balkanlandoj havas la devon, kontraŭbatali ĉiun senrajtigon de iu popolo en la konkiritaj regionoj; kaj kontraŭ la eksplodinta ŝovinismo de l' apartaj Balkanpopoloj ili devas proklami la interfratiĝon de ĉiuj balkanaj popoloj, inkluzive albanoj, turkoj kaj rumenoj.”

W. N.

Moderna utopio.

(Eltirajo el „The Socialist Year Book 1913”, de J. BRUCE GLASIER.)

La «Panama Zone» utopio. — Ni redonu nian antaŭan priskribon eltiritan el parolado pri „Nia socialista ŝtato de Panama”, farita de s-ro F. Bishop, de la „Canal Zone” en la Harvard-universitato, la 29an de junio 1910, en ĉeesto de aŭskultantaro, kiu enhavis eks-prezidanton Roosevelt kaj J. Pierpont Morgan, la financa milionulo.

„Nia familio loĝas en domo planverkita de ŝtata arĥitekto, konstruita de ŝtata laboro sur publika lando, kaj tute meblita de patrea registaro, de la enmarĉaj, cimentaj kolonoj sur kiuj ĝi staras ĝis la ventolilo ĉe la tegmento. Mia patrino mendas la morgaŭajn provizajojn, ordonante senpage per komuna telefono, kaj pagante por ili ne per mono — ĉar oni ne akceptus — sed per kuponoj el unu el la libretoj eldonitaj de la ŝtato al siaj anoj.”

„Pro tio ke tiuj ĉi kuponoj estas senutilaj se ili ellibriĝis, ŝi venigas kaleŝon de la plej proksima veturlejo ŝtata, kaj veturas al la komisara provizejo, kie ŝi povas aĉeti preskaŭ ion je kostprezo. Dume, mi, per la ŝtata fervojo vojaĝas por viziti amikon, kiu montros al mi la ŝtatajn ŝtonejojn kaj ŝip-konstruejojn, ĝis kiam ekpluvas. Tiam ni eniras publikan

amuzejon ŝtatan por glaciaĵoj, mineralaj akvoj kaj biliardoj.

„Vespere ni esperas manĝi ĉe la plej granda kaj plej luksa el la ŝtataj hoteloj, kie havos lokon balo, al kiu mi kondukos la fratino de mia amiko, se la kuracisto ellasos ŝin el la bela sanigejo en Toboga, loko simila la ceteron de la kuraca kaj saniga servado per tio ke ĝi estas tiel senpaga kaj tiel deviga kiel la publikaj lernejoj.”

„Tia estas la ellaborita sistemo de ŝtata propreco, kiu elkreskis en la kanala „Zone” de Panama. Mi diras „elkreskis” ĉar Usono havis nenian intencon fariĝi patreca bienhavanto kaj provizisto, kiam ĝi traktis kun la respubliko de Panama, kaj elaçetis la bankrotan francan kompanion en la jaro 1903.”

Al la supra priskribo oni povas aldoni kelkajn pluajn detalojn el la libro *) de Albert Edwards. Entute, prokimume 40.000 homoj estas dungitaj, el kiaj ĉirkaŭ 30.000 estas nigruloj.

Por la blankaj Amerikanoj funkcias dek kvin hoteloj, kiuj havigas al ili bonajn manĝojn por la sumo de Sm. 0.416.

Dek ok manĝdomoj funkciiĝas por Eŭropaj metiistoj, kie manĝoj dum unu tago nur kostas Sm. 0.832.

Dudek tri manĝejoj por neblankaj laboristoj funkcias, kie manĝoj dum unu tago kostas nur Sm. 0.623.

La nombro de manĝoj en unu monato estis en hoteloj 197.000, en manĝdomoj 286.000, en manĝejoj 456.700, aŭ preskaŭ 12 milionoj poŝare.

Ĉiu ejo estas mem-subtenanta — la celo ne estas profito.

Kondiĉoj de la laboristoj. Tia estas la unuflanka bildo — kvazaŭ fabelo. Kia estas la alia flanko — la kondiĉoj de la laboristoj?

Jen estas la atestaĵo de s-ro Edwards.

Socialista administrado, li diras, ne povus esti pli bonintenca al organizita laboro. Rilate al salajroj, labortempo, sekurigaj aranĝoj, ne ekzistas homoj ĉe la „Panama” kiu aliloke laboris sub pli bonaj kondiĉoj.

Ĉi tio estas vera pri tiel bone organizitaj homoj kiel la maŝinistoj kaj tipografiistoj, kaj ankaŭ pri la senmetiaj laboristoj, blankaj kaj neblankaj.

Nenia kapitalisma konstruistaro en la mondo, diras s-ro Edwards, iam donas al siaj dungitoj manĝi tiel bonajn kiel la kanala komisiistaro.

*) „Panama”, de Albert Edwards.

Ekzistas tre malmulte da dungitoj, kiuj iam aliloke dormis en pli puraj kaj komfortaj litoj, kaj amuziĝis en pli moralaj kluboj.

La nigruloj Burbadian'aj, kiuj en la „West Indies” povas en plej bonaj okazoj laborenspezi Sm. 0.499 potage dum la mezrikolta tempo, kaj kiuj loĝas hejme en ondoladaj domaĉoj, sidas sur skatoloj uzitaj por sekkomercaĵoj, kaj manĝas fruktojn de la arbo „Plantain”, en la „Zone Canal” ili laborenspezas potage Sm. 2.080 — kiu estas Sm. 1.498 pli ol la kosto de tri plenigaj manĝoj: aldone ili havas senpage loĝejon.

La metiistoj, komizoj kaj oficistoj ĉiuj havas la plej altan salajron aldone al la multenombraj bonaj ĝuataj. La procento de akcidentoj por ambaŭ, vojaĝantoj kaj dungitoj, sur la ŝtata fervojo estas malpli granda ol sur ia kapitalista en la monda.

Nenia incitaĵo per la partoprenado de profitoj. Neniu, diras s-ro Edwards, el la 35.000 kelke da laboristoj, de kolonelo Goethals, malsupren ĝis la nigruloj kiuj portas akvon, estas incititaj de espero al partoprenado de profitoj. Ĉiu estas laborenspezisto. Nenia espero al donaco aŭ rentumo agigas laboristojn, kuracistojn aŭ ĉefingenerojn.

Kritiko kaj atestaĵo de Socialisto.

S-ro Edwards raportas la sekvantan aserton de maŝinisto ĉe la „Zone”, membro de la amerika socialista partio:

„Jes, ĉi tio estas bela loko por havigi ideon pri kio povus fariĝi, se ni jam klerigis la homaron ĝis socialismo. Kompreneble, ĝi ne estas socialismo. Unue, ne ekzistas demokratio. Generale Goethals funkciiĝas la aferon. Li estas la plej bona estro, sub kiu mi iam laboris; sed oni ne povas havi socialismon, sen demokration.

Ŝtata propreco ne estas ĉio por ni laboristoj, se la ŝtato ne estas nia. Ĉi tie la registaro ne estas nia.

Kun escepto de tio la „Canal Zone” estas tiel simila al socialismo kiel oni povas havi en la nunaj tagoj — multe pli simila eĉ”.

Kun permeso de la eldonistoj tradukis el la angla lingvo TAGULO.



Lasta vorto pri Esperanta kolonio en Brazilujo.

La Confederação Operaria Brasileira (Konfederacio de l' Laboro Brazila) sin turnas al la laboristasocioj de ĉiuj landoj por lumigi la kondiĉojn de brazilaj laboristoj.

Jen ĝi estas, tradukita el la germana sindikalista organo „Die Einigkeit”.

Rio Janeiro, 27 Marto 1913.

Kamaradoj!

Vi scias, ke la stato de la laboristoj de ĉiuj landoj pli aŭ malpli estas ĉie la sama: la diferencoj, kiuj ekzistas, estas ofte malmultsignifaj kaj kelkfoje tute hazardaj aŭ nur momentaj. Malbonajn spertojn faras ordinare tiuj, kiuj forlasas sian landon, allogitaj per falsaj iluzioj kaj promesoj de la agentoj de la brazila registaro, de homoj, kiuj estas pagataj por allogi laboristojn, kiuj en sia propra lando ne trovas sufiĉan panon. En Brazilujo havas la vivo de la proletario nenion dezirindan eĉ ne por landoj, kiuj pleje estas turmentataj de la malsato.

En la plej multaj landoj de Brazilujo, precipe en la nordo, formigras la popolo amase, por forkuri de certa morto. Tiuj, ne formigrantaj, mortas milope. Tiuj ĉi kondiĉoj regas daŭre en Ceara, en Serjipe kaj en multaj aliaj ŝtatoj de Brazilujo. La sola ŝtato, kiu havas pli bonan staton, estas Sao Paulo.

En tiu ĉi ŝtato oni laboras en la kampoj kaj plantejoj de sunleviĝo ĝis sunmalapero. La salajro estas tiel malmulta ke familioj sin devas kontentigi per faboj blankaj kaj Maniokafaruno (Manioka estas speco de terpomoj). Kelkfoje nur duonaj porcioj.

La terposedantoj (Fazendeiros) havis antaŭe sklavojn, kaj ili estis kutimaj siajn laboristojn ne pagi. Jam ofte provis la laboristoj sian staton plibonigi. Sed ĉiufoje ili estas kruele persekutataj, kaj iliaj asocioj dispelataj. Per la fi-leĝo de la Fazendeiros, leĝo de terura subpremado, kiu la plej malgrandan faron punas per forpelo, la registaro scias bone plenumi sian taskon kiel defendanto de la kapitalismo. La armeo en ĉiuj konfliktoj venas helpi al entreprenantoj kaj ili faras tion kun senekzempla krueleco kaj sen honto. Glavo kaj pafilo estas la solaj argumentoj de la soldataro dum strikoj, same kiel malliberejo kaj forpelo estas argumentoj

de la magistratoj. (La Ĉ. O. B. citas okazintaĵojn dum la strikoj en la lastaj jaroj).

La letero finiĝas tiamaniere:

Kiel pinto de maljusteco estas ankoraŭ ŝanĝita la terura leĝo de ekzilo, kiu donas al la policanaro senlimigatan potencon pri la vivo de la laboristo. Tiu ĉi leĝŝanĝigo okazis rapidege, sen ke estas konataj la plej multaj destinoj. Ĝi estas sekreta dokumento, kies enhavo koniĝos per la uzado de la policanaro, kiam la viktimoj protestas kontraŭ la troa ekspluatado de la kapitalismo.

Ĉar nia afero estas tiu de la internacia proletario, ni esperas, ke la solidareco de la laboristoj de ĉiuj landoj, de ĉiuj, kun ni portantaj la malĝojigajn sekvojn de kapitalista sistemo, ne mankos al ni, kaj ke ni trovos helpon kaj apogon kontraŭ la terura kaj kruela subpremado de la leĝo de l' Fazendeiros kaj de l' jezuitoj.

En atendado de viaj pruvoj de solidareco ni vidas nin jam antaŭe kiel venkantoj, ĉar ni scias, ke per iom da aktiveco kaj energio de la laboristoj de la tuta mondo ni tie ĉi atingos novan venkon, je la komuna malamiko: kapitalismo.

Vivu la socia revolucio.

LA ĜENERALA SEKRETARIO DE LA KONFEDERACIO DE LABORISTOJ BRAZILAJ.

Rio Janeiro, Brazilujo.

Per tio estas finita la movado „Kolonia esperanta en Brazilujo”. Mi jen deklaras publike, ke miaj informiĝoj ne estis tiaj. Kvankam ni estos liberaj, sen iaj ordonantoj, tute egale, ni ne apogas tian fi-regnon. Por mi la afero finiĝis.

Germanujo, Bavarujo.

VIKTORO STRASSER.

La Esfio.

Kunveno de la 18a de Majo 1913. — Kamarado raportas pri la parolado farita en Compiègne, organizata de la grupo socialista, kaj kiu multe sukcesis. La grupo pariza de Socialistaj Studentoj petas pri parolado.

Pri la aliĝo al la Federacio Esperantista de la Regiono pariza, 2 delegitoj estas elektitaj por ĉeesti la Kongreson en Meaux.

Pri la vojaĝo en Germanujo, organizota de l' Humanité 2 kamaradoj interrilatos kun Cachin.

La kunveno de Junio okazos la 15an kaj diskutos la rezoluciojn de la Kongreso de Frankfurt a/M.

Kunveno de la 15a de Junio 1913. — Presita kurso komenciĝos en la Bulteno de la Kooperativa Federacio. Principe la grupo pariza aliĝas al la Federacio esperantista de la Regiono pariza.

K-do Hermant zorgos pri la organizo de la laboristaj kunvenoj dum la Kongreso de Bern; li pri tio interkonsentiĝos kun la Germana Laborista Asocio.

Post diskutado pri la decidoj de la Frankfurt'a Kongreso la grupo decidas:

1o. la esperantistaj laboristoj partianoj de la moderna laborista movado devas krei 1 organizajon po regno;

2o. la internacia organizajo devos havi Centran Oficejon kiu regule interrilatiĝos kun la naciaj asocioj.

La ĝenerala kunveno okazos la dimanĉon 20 de Julio, je la 9a matene, Komuna Domo de la 3a, 49 rue de Bretagne.

La sekretario,

SENRONO.

SOCIA MOVADO.

El Grand-Britujo.

Anglujo. — La angla registaro preterpasas ĉiajn reaciajn historiaĵojn. En 1849 ĝi sendis paŝipon por protektado de ruslandaj politikaj gehomoj en Aleksandrio; en 1913, oni transdonis en tiu urbo al paĉjo la sangaro de Rusujo K-do Arle (Adamovich), kiu, malgraŭ la protestoj de ĉiaj progresemuloj, estas fordonita al la sangaviduloj.

S-ino Davidson, feministino, perdis sian vivon por la virina kaŭzo. Ŝi ĉeestis la ĉevalkonkurson kaj haltigis la ĉevalon de la reĝo. La jokeo, ĉevalo kaj bravulino kuŝis antaŭ la okuloj de kelkmilionoj da ĉeestantoj. Hodiaŭ ŝi estas mortinto; ni esperu ŝi ne mortis vane. Ĉu balotrajto valoras la pardon de vivo? Al mi neniam, al ĝi tiuj virinoj jes, kaj estas sufiĉe, ke unu virino mortis, donu al ili la baloton, malkuraĝa registaro.

S-ino Hyndman, edzino de la fama soc.-dem. Hyndman, estas grave malsana: Ni esperu ŝian rapidan resaniĝon.

Ĉie strikoj, ĉiam strikoj. (Sufiĉa! la horo alvenas).

La skandalo pri la ministaro kreskis pluen per la juĝado

de Cecil Chesterton pri lia jurnalo, oni punis lin 2000 Sm., ĉar li estis juĝita kulpinda laŭ kvin el ses kulpajoj, la juĝisto diris ke li povas sendi lin al malliberejon por ĉiu kulpo, la skandalo certe estas veraĵo. Markona senfadena telegrafio, estos la difektado de la liberala registaro. HOYLE.

Irlando. — La ribelo kontraŭ hejmgregnado maturiĝas. La polico kaptis ŝipŝarĝon da pafiloj, la Nordirlandoj de longe praktikis la militistan ekzercadon, kaj la estroj de la ribeloj, kiuj okupas altajn poziciojn, ankoraŭ estas liberaj, sed la malfeliĉaj virinoj estas malliberigitaj. La kialo de la kontraŭeco, estas laŭŝajne religio, Katoliko kontraŭ Protestanto, sed efektive la irlandaj terposedantoj prosperis tiom bone sub la lastaj registaroj, ke ili ne ŝatas la juĝon de iliaj samlandanoj. Kaj sendube, pri la estonteco ili certigos la sorton de iliaj subpremintoj. La intereso de la ruĝulo restas en la fakto ke nur post la malsukceso de la hejmgregnado estos ebla la disvastiĝo de socialista celo. La atendota memregnado estis tiel multe parto de la vivo de la Irlandanoj, ke nenia ideo povas prosperi, socialistoj kaj anarhiistoj estas treege malabundaj en la ĉiam verda lando, kie la pastreco estas faranta sian lastan starejon sur la nescieco de la popolo, kaj post la iluzio de „memregnado”, ni vidos rapidan ŝanĝon en la socialisma idealo de Irlando. J. HOYLE.

El Bulgarujo.

Alvoko al la tutmonda esperantistaro. — Karaj gesamideanoj, Nia ideo pri la paca disvolviĝo de l' popoloj kaj ilia proksimiĝo per unu komuna neŭtrala lingvo, hodiaŭ suferas plej teruran frapon en nia patrujo — Bulgarujo — la lulilo de l' Balkana esperantismo. Ni, la bulgaraj esperantistoj, donis karajn oferojn por la liberiĝo de l' kunigitaj Balkanaj popoloj. Hodiaŭ, tamen, ni vidas, ke la diplomatoj de Peterburgo malheligis la historion de l' XXa centjaro per la restarigo de l' sklaveco, tiel solene nuligita dum la pasinta centjaro. La Peterburga ambasadora konferenco, pro la postulo de oficiala Rumanujo, transdonas bulgaran teron de kelkaj dekoj da kvadrataj kilometroj kune kun miloj da Bulgaroj, parolantaj sian gepatran bulgaran lingvon, al Rumanujo kiel sklavojn. Ili devos ellerni tie la rumanan lingvon. Ĉu vere la homoj nun estas falintaj pli malsupren ol la brutoj, por esti interŝanĝataj inter diversaj landoj kiel senvivaj trunkoj? Ni, la esperantistoj en

Bulgarujo, sciantaj ke unua estis Bulgarujo sur la Balkanoj, kiu akceptis la paco rimedon por la alproksimigo de l' popoloj — la lingvon — estas devigitaj fari kongreson en Silistria kaj pritrakti la demandon, kian konduton ni devas fari rilate al la kreo de nova kaŭzo de milito sur la Balkanoj, per la cedo de Silistria al Rumanujo, la estonta Elzaso kaj Lotaringio inter Bulgarujo kaj Rumanujo. La rumanaj esperantistoj servos al la paco kaj al sia patrujo, se ankaŭ ili partoprenos en tiun packonferencon. La rumana reĝino Elizabeto, kiu okupas unuan lokon en iliaj vicoj, nun pruvu, kiel merite ŝi estas portinta la nomojn: grandega esperantistino, paca batalantino. La tutmonda esperantistaro ankaŭ faros duoblan servon kaj helpon, ekinteresiĝante pri tiu grava por la estonta paco demando kaj subskribante la proteston de la bulgaraj esperantistoj kontraŭ la mizera fako de l' XX centjaro, la transdonado de homoj kiel sklavoj. Ili sciu, ke eĉ Rumanoj trovas ke „laŭ tute senpartiaj kaj justaj vidpunktoj estas tute malprave, ke Bulgarujo cedu parton de la lando al Rumanujo, kvankam tiu ĉi nenion perdis kaj neniel estis ĝenata dum longa vico da jaroj t. e. de post la rusa-rumana-turka milito 1877”.

La ideo de la esperantistoj estas kontraŭa al la decido de l' Peterburga konferenco. Oni rememoru pri la Berlina traktato de 1879! Estas bezone ke via respondo venu kiel eble plej frue. La tuta esperantista gazetaro estas petata publikigi la jenan alvokon.

Kun estimo: IVAN H. KRESTANOF.

Oni bonvolu adresi ĉion rilatantan al tiu afero; al S-ro D-ro Ĥristo T. Rjahovski, en gara Levski, Bulgarujo.

El Francujo.

Konferencoj pri la Balkana milito en Esperanto. — Post afabla invito de S-ro Prof. Rouseau, Rektoro Boirac k. a., nia bulgara samideano S-ro Iv. Krestanof (kiu de 2½ monatoj troviĝas en Francujo, Dijon, str. Neuve-Bergère, 36, kie li daŭrigas siajn filologajn studojn) faris publikan paroladon en Esperanto pri „Balkanoj kaj la Milito” (geografio, historio, loĝantaro, religioj, kaŭzoj de l' milito, moralaj kaŭzoj de l' venko, nuna situacio kaj

aspiroj de l' kunigitaj Balkanaj popoloj) en Dijon kaj poste en Dôle, Beaune, Lyon, Grenoble, Mâcon k. a. Ĉie li havis grandajn sukcesojn kaj la lokaj jurnalaj tre favore raportis pri tio kaj resumis liajn paroladojn. La fakto mem, ke li uzas tre facile kaj perfekte Esperanton, sufiĉe propagandas ĝin kaj montras klare antaŭ la okuloj de ĉiuj kiel viva kaj taŭga ĝi estas por ĉio. Nun li estas invitita refari siajn paroladojn en aliaj urboj. V. S.

La monatan artikolon de kdo Panlou la kompostisto re-sendis; manko de spaco; do en la duonjulia intertempa n-ro.

El Germanujo.

La teksistoj en Rajnlando (Prusujo) strikas dum 10 semajnoj. La venko estos malverŝajna, ĉar la teksistoj de la sama asocio (Germana Asocio de Teksistoj) laboras en proksimeco 10—14 horojn por ke la produktoj ne manku.

Jen mankas solidareco.

La traktadoj inter la reprezentantoj de la konstrufako, kiuj komenciĝis Kristnasko, estis finitaj je komenco de Majo kaj estis gajnate 2 fenigoj ĝis 5 en 3 jaroj. Parta plimaltigo de labortempo de 10 horoj al 9½.

Per 8-taga ĝenerala striko estus gajnita triope. Estus ankaŭ necesa.

La pentristoj post longa traktado estis jetataj al la pavimo. Ankoraŭ multe tie kuŝas. La aliaj devas batali loke aŭ esti trankvila.

El Hungarujo.

La hungara registaro falis, ĉar unu deputito (Deŝi), pruvis antaŭ la juĝistaro, ke la ĉefministro (Lukaĉ), antaŭe financministro, ŝtelis el la mono de la lando por partiaj celoj. Li nur al tiuj kapitalistoj donis bonajn negocojn, kiuj donacis grandsumon da mono en la partikason. Plue malkovriĝis, ke li akceptis 500.000 kronojn de iu bankiero pro tio, ke tiu fariĝu senatano. Sed la afero nun ne sukcesis.

La deputiton ne la sento de justeco gvidis en sia malkovro, sed la venĝo. Lukaĉ agis ne plaĉe al la opozicio, tial la suprenomita deputito kriis en la mondon (kion la paseroj jam delonge sciis), ke Lukaĉ ŝtelis kvin milionojn el la mono de la lando. Se la ĉefministro ne estus aginta tiel arogante, tiam Deŝi neniam estus malkovrinta la aferon, kaj ili ambaŭ restas egale honestaj homoj.

Jen. tial penadegas ĉiuspecaj politikaĉistoj eniri en la parlamenton. ĉar se oni estas deputitoj aŭ ministroj, tiam senpune povas ŝteli. Kaj ĉi tiuj grandaj ŝtelistoj fabrikas leĝojn kontraŭ honestuloj!

SINCERA.

El Mandjurujo.

La de Majo estis en Ĥarbin tago de surprizo por loka tiel nomita „laborista iniciativa grupo“, kiu konsistis el tri social-demokrataj laboristoj: T. Potorochin, J. Klein kaj V. Lvov, kiuj ricevis sekretajn sciigojn, ke aparta konsilaro ĉe administranto de Ĥina-Orienta fervojo decidis elsendi ĉi tiujn personojn el la limoj de Mandjurujo, kun malpermeso loĝadi en grandaj urboj kaj kun submeto al observado de polico. Unu el ili, T. Potorochin (nia kunlaboranto Kompostisto), sukcesis forkuri al Aŭstralio, sorto de aliaj estas nekonata. Kaŭzo de elsendo: propagando de ideoj de socialismo, organizado kaj gvidado de progresiaj laboristaj societoj k.t.p.

KOMPOSTISTO.

El Rusujo.

La politikaj ekzilitoj (Daŭrigo kaj fino; vidu nron de junio). — Tiel oni priskribas en instruistaj leteroj en ĝeneralaj trajtoj la fizikan medion de l' nuntempa ekzilo: malvarmo, malsato, vivaĉo en malhigienaj kondiĉoj, eĉ en infektaj kloakoj kaj, kiel rezultato: malfortiĝo, plena malordigo kaj ruiniĝo de l' organismo, malsanoj . . .

Al turmentoj fizikaj estas ankoraŭ aldonataj turmentoj moralaj. Kion suferigas la scio, ke la familio, kies sola „nutranto“ estis la ekzilito, pereas ankaŭ pro malsato? aŭ la sciigo „de tie“ pri pereanta familio, pri mortanta maljunulino-patrino. Tie la mortanta patrino, ĉi tie la malsatanta infano, jen la en senliman mizeron falinta familio, jen la forpelita el lernejo filo, — tie ĉi ankaŭ la malvarmo, malsano, ruiniĝo kaj plene senhelpeco . . .

„ . . . Pardonu min ke mi maltrankviligas vin pri mia persona vivo. Mi ne decidus tion fari se tio ne estus por mi la demando de vivo kaj morto. Instruante, mi estis la „nutranto“ de mia patrino kaj 3 fratinoj, el kiuj la unu mi edukis por mia konto en gimnazio. Post mia aresto la familio restis sen ia ajn subteno kaj nun suferas egan mankon, kaj la fratino, lernanta en gimnazio, estis devigata forlasi la gimnazion. Longedaŭre mi pripensadis kielmaniere helpi la malfeliĉan fratinnon kaj mi decidis, finfine, venigi

ŝin al mi pro regna konto kaj komenci (mi mem) sin instrui; sed, dank' al „ŝtampo de Kaino“ mi povas trovi nenian laboron, kaj mi kune kun mia fratino ekzistas nur per registara donajaĉo, mankante la plej necesan, kiel ekz. varman nutraĵon, tolaĵon k.c. . . .”

La mensan vivon de ekzilito, iu korespondanto el Narim priskribas tielmaniere: „Narim estas, ŝajne, la plej malviva urbo en la tuta mondo. Ne parolante jam pri tio, ke tie ĉi ne ekzistas eĉ unu konvena biblioteko, tie ĉi ne ekzistas eĉ la homoj, kies pensoj iras super siaj hejmintereso . . . Ricevi ion, en mensa senco, ĉe lokaj loĝantoj, ni ne povas; necese estas ke ni mem ion donu al ili. Por tiu celo ni aranĝis tie ĉi lernejon, kiun vizitas ĉiuj kamaradoj por tie lerni. En nia lernejo oni instruas la jenajn fakojn: legado, aritmetiko, geometrio, algebro, franca, germana, latina lingvoj, historio. Domaĝe estas, ke ni ne havas bonan lernolibrojn. Ni multe legas en soleco kaj en rondetoj. Tielmaniere fluas niaj tagoj, ĝenerale unutonaj, enuaj: estas tre malmulte da vivo.”

„La ĉagreno de devigata senlaboreco ĉiujn enuigas. Ni provis iel utiligi niajn fortojn en tiaj malproksimaj, sovaĝaj lokoj, sed ni ne sukcesis.”

Sed, se tiel mizera, malluma, unutona estas la vivo de ekzilitoj en tiaj centroj de l' ekzilo kiel Narim — en malproksimaj, maloftevizitataj lokoj la vivo estas ankoraŭ pli netolerebla. Tie ĉi ja iom estas eble interparoladi kun kamaradoj, iel uzi siajn fortojn (ekz. lernejo), sed tie, kiel ekz. ĉe tiuj, kiuj estas dislokitaj en „ostjakaj“ nomadejoj, eĉ la lastaj konsoloj mankas: „nek libroj, nek gazetoj; estas eble frenezigi“; kaj kiuj povas, tiuj riskas forkuri el ekzilo, „pli bone estas perej ol mortaĉi malrapide, ol frenezigi. Ni ne havas plu da fortoj sidi, nenion laborante”.

Sed forkuri povas nur tiuj, kiuj estas kunligitaj kun diversaj organizaj kaj disponas je rimedoj. La ceteraj penas esti translokigitaj almenaŭ en centrojn de ekzilejo. La solo, subtenanta la ekzilitojn, estas iu komunikajo el Rusujo. Tio, ekscitas por momento la unutonan vivon de ekzilitoj. „Ni ricevis la unuan poŝton (Narim, la 11an de Novembro) kaj hodiaŭ ni havis, sekve, grandan feston . . . La urbo, ĝis nune malviva, subite ekviviĝis . . . Dise kaj grupe ni kuradis al la poŝto kaj returne, vikle babilante kaj divenante pri okazintaĵoj kaj novaĵoj el Rusujo . . . La senpaciento estis granda.

Sed ĉiuj disreviĝis, kiam ili eksciis, kio tie okazas. La vigan

humoron baldaŭ anstataŭis la malĝojego. Tiel trapasis nia hodiaŭa tago, tiel ĝoje komencita kaj tiel malgaje finita . . ."

Post alvoko de Dua Duma kaj dum ĝiaj kunsidoj ankoraŭ estis iu malforta espero, ke la politika barometro plialtiĝos, ke, eble, libereco ne estas malproksima. Dum tiu periodo la leteroj de l' ekzilitoj spiris vigle kaj energie. Kelkaj ekzilitoj rifuzis la materialan subtenon, esprimis la varmegan kredon je pli bona estonteco. Sed, iom post iom la barometro politika estis plimalaltiganta, reakcio transversis sin pli kaj pli sur la „vizaĝo de l' rusa tero", kaj la vigleco de l' ekzilitoj ankaŭ malaperas kaj la esperoj estingiĝis.

„La sendaĵo, ricevita je mia nomo, estis malfermita kaj denove kudrita per bluaj fadenoj; la leteroj de kelkaj ekzilitoj estas malfermitaj per la postoficistoj mem; triobligas la nombro de gardistoj . . ."

„La Toboljska („Toboljsk" estas la nomo de regiono) „ispravnik" (unu el policedoj) dispeligas la kunvenon de ekzilitoj, ili rifuzas konfesi kaj akcepti iliajn delegitojn. Eĉ la malplej libera movado estis malpermesata. Kiu el ili aperas en urbo (la sola loko, kie ili povas aĉeti bezonajn kompareble malmultekoste), tuj li estas resendata perforte, k.t.p."

Nature estas, ke la lastaj leteroj atestas trege premigitan humoron, precipe en lokoj malofte vizitataj regas pesimismo, perdiĝas la fido, ke la liberiganta movado venkos; kaj neniu estos tie por plifortigi la kredon je sukceso de komencita afero.

La humoro estas premigita, ĉe ĉiuj estas rimarkebla apatio al ĉio, k.t.p., . . . Alia plendo de la ekzilitoj estas, ke en iliajn viĉojn estas enskribitaj de administracio, kiel politikuloj, ankaŭ elementoj, kiuj havas nenion komunan kun la liberiganta movado. Ĉi tien estas senditaj ankaŭ tiuj, kiuj partoprenis, ŝildante sin per revolucia standardo, en diversaj faradoj de „huligana" (rabista) karaktero. Tial, en ekzilo, kune kun homoj de alta morala indeco, honestaj kaj entuziasmaj, vivas ankaŭ la tipaj „huliganoj", rabistoj, eljetinduloj de l' socio, la „funduloj", kiuj mallogas per sia konduto la lokan loĝantaron, makulas la nomon de politik-ekzilito kaj malamigas la ekzilitojn. En similaj kondiĉoj eĉ la plej fortaj homoj povos fali en malgajan humoron — kion do diri pri homoj malpli fortaj kaj malpli persistemaj?..

S-ro V. M.

Esperantigis el ĵurnalo „La Siberiaj Demandoj"
pastro IN. SERIŠEV el Siberio.

El Usono.

Usono neniam spertis tiom da gravaj strikoj kiel nuntempe. Estas la laborista organizaĵo, nomita „Industriaj laboristoj de la mondo", konata ĉie en Usono sub angla mallongajo „I. W. W." Ĝiaj ĉefaj sekretarioj Haywood, Ettor, Giovannitti, Quinlan, Tresca, Lessig kaj aliaj, ĝiaj sekretarioj Elizabet Gurley Flynn kaj Rabinoviĉ laboras kun plej granda memferemo por la ideo de „unu granda laboristaro". — En tempo de preskaŭ unu jaro ili kondukis kaj gajnis la strikon de la teksistoj en Lawrence, Mass., kaj en Little Falls, N. Y., dum ili perdis la strikon de la kelneroj en Nov-Jorko.

Nun ili kondukas jam de 17 semajnoj la strikon de la silkteksistoj en Paterson, N. J., kaj samtempe la strikon de la razistoj en Nov-Jorko, kiun lastan ili gajnis dum nur unusemajna strikado. La striko en Paterson estas grava, ĉar la plej multaj silkteksistoj, 18000 membroj, staras fortege ĉe la „I. W. W." Dum la daŭro de tiu striko, alia tie ĉi ekzistanta laboristaro: „Amerika Federacio de l' laboro" enmiksas sin en Patersona striko, celante rompi la fortecon de la „I. W. W." precipe la bonan nomon de kdo Haywood, sed tiu konservativa organizaĵo, kiu ŝajnas dormi en nacia sonĝo, nur sukcesis tiri sur si la ridemon, ne nur de strikantoj, sed de ĉiuj pensantaj laboristoj.

Kdino Flynn kaj kdo Boyd sukcesis kiel en Lawrence ankaŭ en Paterson kun transloĝigo de la infanoj de strikantoj. La lan de Majo preskaŭ 80 infanoj post la parado estis disloĝigitaj ĉe Nov-Jorkaj radikalistoj kaj poste ankaŭ preskaŭ 100 infanoj, kaj pli ol 300 Nov-Jorkaj familioj estas pretaj preni infanojn de la strikantoj el Paterson. Tiuj infanoj vizitas la Nov-Jorkajn dimanĉajn radikalajn lernejojn, precipe la Ferrerajn lernejojn, kie ili ricevas edukadon por la kunhelpado de siaj gepatroj en la strikoj, ĉar ĉiu sukceso de strikantoj alportos al ili multajn sentebajn profitojn.

Ĉar la kapitalistoj kune kun siaj juĝistoj kaj policistoj nun ekvidis la perdeblecon de sia povo, ili ekkaptis ĉiujn sekretariojn kaj ilin arestigis, sed post mallonga tempo (ĉar ĉiam la kamaradoj trovis la kaŭcion por la juĝejoj), ili estis liberigataj. Sed la kamaradon Quinlan oni kondamnis pro instigo al ribelo inter la strikantarano. Kaj nun kdo Quinlan diris al la laboristoj, ke li estis antaŭ la plej malbonega juĝistaĉo en la mondo, kaj kiam la fama aŭtoro Bernard Shaw skribis unu el siaj dramoj, kritikante urbon, ĝian juĝist-

aron kaj estraron, li certe pensis pri Paterson, N. J. — Se Quinlan ne estos liberigata, tiam strikos fervojistoj kaj veturigistoj kaj tiamaniere la urbo de Paterson, N. J. havanta pli ol 150.000 loĝantoj, povas resti sen lumo kaj sen iu movanta maŝino! Certe, se tio povas okazi en iu ajn urbo, la strikantoj ne povus perdi, ĉar la kapitalistoj restus dum tiu senmova tempo sen profito kaj prezentus al la laboristoj eble pli ol ili dezirus (se ne vere bone trovita)?!

KLAJIN.

Pri lingvaj kaj aliaj aferoj.

Kiam redakcio de I. S. R. ricevis la artikolon de k-do Chaloupecki, ĝi paliĝis kaj ekstremitis — ĝi vidis proksimiĝi fluego da artikoloj, respondoj, protestoj k.t.p.: Tiu fluo ne forrestis — venis jam deko da artikoloj, sufiĉe por plenigi almenaŭ duonnumeron! Kaj la k-do de l' Esperanta kolonio sendis sufiĉe por plenigi la alian duonon; kaj ĉiu artikolo kutime provokas serion da aliaj, kvazaŭ ni havas ĉiutagan gazeton. Redakcio nepre devas petegi al la k-do, ke oni raportu mallonge; ke oni ne skribu pri aferoj, kiujn ĉiu homo ĝis en afrikaj dezertoj jam legis monaton antaŭe en sia loka gazeto; oni ankaŭ ne sendu novaĵojn, kiuj apenaŭ estus presataj en la rubriko „Diversaĵoj“ de ĉiutaga gazeto de provinca urbeto kun dek mil loĝantoj!

Al la kamaradoj, kiuj respondis la artikolojn pri lingvaj aferoj, la redakcio petas permeson: fari el ĉiuj artikoloj kune unu artikolon. Du (de k-do Tagulo kaj de la unua redaktoro de I. S. R.) jam estas kompostitaj; sed ne da spaco por ili.

Je la „Alvoko“ en Junia n-ro redakcio ricevis dekon da opinioj, ĉiuj forte laŭdantaj la ideon. Neniu malaprobis ĝin. Nur unu k-do proponis: atendu ĝis 1914. Sed, deko da opinioj, ĉu tio sufiĉas? Kion pensas niaj k-do-aj agentoj pri dusemajna apero de nia Revuo? Redakcio atendas kaj intertempe preparos duan eksterordinaran numeron meze de Julio.

Nia Revuo nomiĝas „internacia“. Sed, en multaj landoj ĝi ne havas ankoraŭ unu leganton. Neniu en Danujo, Svedujo, Norvegujo, neniu en Grekujo, Montenegro, en multaj aliaj estas nur en unu aŭ nur en du, tri lokoj leganto de I.S.R., kaj ni silentu pri ekstereŭropaj mondpartoj. Ankaŭ en multaj grandurboj de Eŭropo nia organo estas ankoraŭ nekonata — en Madrid, Lisbono, Romo, Napolo, Venecio, Bazelo, Berno.

Edinburgo, Bordeaux, Strassburg, Mannheim, Magdeburg, Aachen, Stettin, Odessa, Warzawa kaj centoj da aliaj ne estas unu leganto. Kiu povas doni al I. S. R. adreson de iu progresema esperantisto en tiuj landoj kaj urboj?

Pri protesto.

(Vidu 167an paĝon.)

La sekcio de „Liberiga Stelo“ de Sotteville-les-Rouen sciigas, ke la asocio internacia de la progresemaj esperantistoj, pri kiu oni parolas, ne estas nova asocio, sed ke ĝia nomo estas „Liberiga Stelo“ kaj estas la plej malnova, fondita en 1906 per la kunigo de „Paco-Libereco“ kaj „Laboristaro Esperantista“.

La procedo de bojkotado ne estas ankaŭ nova. Ĉio estas vana, ĉar ni deĵoras.

LA SEKRETARIO.

KORESPONDADO.

Multaj gek-do-aj en ĉiu numero de tiu ĉi gazeto deziras korespondadon. Kiam oni skribas al iu k-do, tiam oni ricevas unu aŭ plej ofte neniun respondon. Kial? Ĉar plej multe da kamaradoj nur deziras pk. kun belaj vidajoj. Laŭ mia opinio havas valoron la interŝanĝado de pk. nur tiam, kiam oni skribas pli ofte kun la sama k-do; ĉar en la unua pk. ĉiam estas skribata la sama. Per tio neniun povas lerni la internacian kompreneblon de nia lingvo, ĉar en ĉiu lando estas alia kutimo por skribi. Se nun iu k-do havas intencion laŭ mia opinio korespondi kun mi, mi respondos tuj kaj ĉiam. : Ernst Schmerlen, Chemnitz, Fichtestr. 13, Sachsen, Germanujo.

Germanujo: K-do Wilh. Rebstock, en Derendingen-Tübingen, Württemberg, dez. kor. kun alilandaj gek-do-aj, precipe kun japanoj. — K-do Karl Hoffmann, Friedrichstr. 67, Dortmund, dez. kor. kun eksterl. gesam-oj; ĉiam tuj respondos. — K-do Ervin Richter, Gretscherstr. 9/II m., Leipzig. Sell, dez. kor. — K-do Arno Jahn, Böheimstr. 7/II, Stuttgart, dez. kor. per il. pk. — K-do Walter Ludewig, Görlitzerstr. 28/II, Dresden-N 12, dez. kor. — K-do A. Nordmann, Grünstr. 3/II, Hannover, dez. kor. kun gesam-oj en la tuta mondo; tuj kaj ĉiam respondos. — K-do L. Böker, Schaum-

burgstr. 24, Herrenhausen apud Hannover, serĉas kor. per kartoj. — Joh. Majer, Georg Weihs kaj Leonhard Bandeon, ĉiuj Villastr. 22, Stuttgart-Berg. — Ernst Schwarz, Poststr. 10, Stuttgart-Berg. — Karl Ziegler, Wiesenstr. 41, Stuttgart-Canstatt. — Wilhelm Herbert, Mark-Aurelstr. 13/I, Frankfurt-M.-Heddernheim, dez. kor. kaj interŝanĝi pm.; ĉiam resp. al ĉiuj. — Robert Wolf, Kasernenstr. 19/I, Dresden-N., dez. kor. kun gek-doj. — K-do W. Schneider, Lindenstr. 47/II, Düsseldorf, dez. kor. kun gek-doj en ĉiuj landoj. — S-ro L. Pick, Nikolausring 9, Strassburg en Elzas, dez. kor. per il. pk.

Ĉu k-do M. da Silva Carvalho en Porto ne ricevis la majan karton de k-do Hoffmann en Dortmund? — Ĉu fraŭlino Jonas en Parizo ne ricevis la lastan p.-karton de k-do Hoffmann en Dortmund?

Anglujo: K-do L. Haensler, 25 Binnie Str., Bradford, volas kor. kaj interŝanĝi postmarkojn kun gek-doj en ĉiuj landoj.

Aŭstrio: K-do V. Beĉak, en Hostomitz ad Biela, Bohemujo, dez. kor. kaj interŝ. vidajkartojn; tuj respondos — K-do Antono Panchartek, XV Würfelgasse 2, III, II, 57, Wien, dez. kor. per il. pk.; tuj kaj al ĉiu respondos.

Ĉu k-do Hoyle ricevis mian leteron? Raimond.

Kongreseto de la ruĝuloj en Berno.

La gekamaradoj intencantaj partopreni ĝin estas petataj tuj skribi al nia redakcejo, kiu enpresigos la liston en nian aŭgustan numeron.

Intencante partopreni je la Berna Kongreso, mi dezirus havi kelkajn sciigojn pri la urbo, hoteloj, restoracioj k.t.p.

Ĉu kamarado el tiu urbo aŭ konante tiun urbon, bonvolus terrilati kun mi? Albert Raimond, 11 Rue Gossec, Paris 12.

Verdsocialistoj, kiuj ĉeestos la Naŭan Esp. Kongreson en Berno kaj vizitos aŭ traveturos München, estas petataj sendi siajn adresojn al k-do A. Fleschutz, München, Hübnerstrato 21/II, kiu prizorgos kunvenon, paroladojn k.t.p.

Venu grandare, vi estos ĝoje akceptataj!